SANKTA FAMILIO – 26-a de decembro 2010

PRENU KUN VI LA INFANON KAJ LIAN PATRINON KAJ FUĜU EN EGIPTUJON – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt 2,13-15.19-23

Tuj post la foriro de la Saĝuloj, anĝelo de la Sinjoro aperis en sonĝo al Jozefo, kaj diris al li: "Leviĝu, prenu la infanon kaj lian patrinon, fuĝu en Egiptujon, ĉar Herodo klopodas trovi la knabeton por lin pereigi. Vi devas resti tie, ĝis mi parolos al vi".

Jozefo vekiĝis, prenis la knabeton kaj lian patrinon, kaj iris al Egiptujo. Tie li restis ĝis la morto de Herodo. Tiel plenumiĝis tio, kion la Sinjoro diris per profeto: "El Egiptujo Mi vokas mian Filon".

Post la morto de Herodo, anĝelo de la Sinjoro aperis en sonĝo al Jozefo en Egiptujo, kaj diris al li: "Leviĝu, prenu la knabeton kaj lian patrinon kaj iru kun Li en la landon de Izraelo, ĉar mortis tiuj, kiuj insidis la vivon de la infano".

Jozefo leviĝis kaj kunprenis la infanon kaj lian patrinon, kaj eniris la landon de Izraelo. Sed li aŭdis, ke Arkelao reĝas en Judeo anstataŭ sia patro Herodo. Jozefo timis iri tien, kaj avertite de Dio en sonĝo li loĝiĝis en la regionon de Galileo, kaj loĝis en urbo nomata Nazaret. Tiel plenumiĝis la antaŭdiro de la profetoj: "Li estos nomata Nazaretano".

La promesita lando transformiĝis en landon de sklaveco kaj morto, de kiu oni devas fuĝi. La evangeliisto antaŭigas, en la epizodo de la infanaĝo de Jesuo, tiujn tragikajn okazaĵojn kiuj poste evoluos dum la tuta vivo de Kristo. Sed ni rigardu la tekston.

"*Tuj post ilia foriro*", li estas parolanta pri la Saĝuloj, "*anĝelo de la Sinjoro*", jen revenas tiu esprimo, tio estas Dio. Dio, kiam li intervenas ĉe la homoj, neniam estas bildigata kiel dia realo, kiel si mem, kiel la Sinjoro, sed ĉiam per tiu ĉi esprimo "anĝelo de la Sinjoro", sed estas ĉiam la Sinjoro kiam li kontaktiĝas kun la homaro.

Tiu ĉi anĝelo de la Sinjoro intervenas tri fojojn en tiu ĉi evangelio por anonci la vivon de Jesuo al Jozefo, por ĝin protekti, kiel en ĉi tiu kazo, de la mortigaj celoj de Herodo, kaj poste por lin konfirmi en la momento de la resurekto.

"*Aperis en sonĝo*", la Sinjoro aperas en sonĝo al la profetoj, do Jozefo estas iasence kvalifikata kiel profeto, "*kaj diris al li: "Leviĝu, prenu la infanon kaj lian patrinon kaj fuĝu en Egiptujon*". Jen la promesita lando transfomiĝis en landon de sklaveco. La popolo fuĝis de Egiptujo por eniri la promesitan landon, sed nun ĝi devas fuĝi de la promesita lando por iri trovi rifuĝon ĝuste en Egiptujo.

"ĉar Herodo klopodas trovi la knabeton por lin pereigi. Vi devas resti tie, ĝis mi parolos al vi". La novaĵo estas verŝajna. Ni scias ke Herodo, la laŭleĝa reĝo, suspektema pri ĉiu kiu povus forpreni de li iamaniere la kronon, ne hezitis elimini dekon da siaj familianoj, eĉ mortigis tri filojn, la lastan nur kelkajn tagojn antaŭ sia forpaso. Do la novaĵo estas verŝajna.

Sed estas la respondo de la povo al la Dia donaco, samkiel la faraono klopodis mortigi Moseon, tiel Herodo klopodas mortigi Jesuon. Kaj la evangeliisto priskribas la fuĝon de Jozefo kiel la fuĝon de la hebrea popolo de Egiptujo dum la Paska nokto. Fakte "*Li leviĝis dumnokte" kiel dum la nokto de la liberigo, "prenis la knabeton kaj lian patrinon, kaj iris al Egiptujo. Tie li restis ĝis la morto de Herodo. Tiel plenumiĝis tio, kion la Sinjoro diris per profeto: "El Egiptujo Mi vokas mian Filon".*

La evangeliisto do utiligas tiun profetaĵon de Hoŝea por vidi kiel la agado de la Sinjoro protektas ĉiam lian popolon kiam ĝi troviĝas en danĝeraj situacioj. "*Post la morto de Herodo*…" jen refoje la anĝelo de la Sinjoro kiu agadas denove*, "… anĝelo de la Sinjoro aperis en sonĝo al Jozefo, kaj diris al li: "Leviĝu, prenu la knabeton kaj lian patrinon*…" kaj ni atendus ke la anĝelo diras al Jozefo "Reiru en la landon de Izraelo".

Kaj male tiu diras al li: "*iru en la landon de Izraelo*" kaj ni vidos la kialon " *ĉar mortis tiuj, kiuj insidis la vivon de la infano*". La evangeliisto elprenas tiun lastan eldiron de la libro de la Eliro kie legeblas ke "*la Sinjoro diris al Moseo: "Leviĝu kaj reiru en Egiptujon: mortis tiuj kiuj atencadis al via vivo".*

La evangeliisto do prezentas Jesuon kiel la novan Moseon, la novan liberiganton de lia popolo. Sed kial la evangeliisto ĉi tie, krom la citaĵo de la libro de la Eliro, diras ke estas mortintaj tiuj kiuj klopodis mortigi la infanon, kiam reale estas unu, Herodo, tiu kiu klopodas mortigi la infanon? Ĉar la evangeliisto volas anticipi tion kio estos la agado de la religiaj institucioj kontraŭ Jesuo. Do en 'tiuj' estas entenataj la fariseoj, la ĉefpastroj, la pliaĝuloj, la tuta religia elito kiu sin ĵetos kontraŭ Jesuon.

"*Jozefo leviĝis kaj kunprenis la infanon kaj lian patrinon, kaj eniris la landon de Izraelo*." Jen ankaŭ ĉi tie refoje ni estus atendintaj "revenis en la landon de Izraelo", male la evangeliisto skribas ke Jozefo, kun la infano kaj la edzino, ne revenas en la landon de Izraelo, sed eniras. Li eniras samkiel la popolo kiam ĝi eniris en la promesitan landon. Do jam estas la anticipo de tio kiu estos la liberiga procezo, la nova eliro kiun Jesuo plenumos.

"*Sed li aŭdis, ke Arkelao reĝas en Judeo anstataŭ sia patro Herodo*". Post la morto de Herodo la regno estis dividita inter la tri filojn. Arkelao ricevis Judujon kun Samario, kaj Idumeom; Herodo Antipa Galileon kun Pereo, kaj Filipo la tutan nordan parton oriente de Tiberiada lago. Do tiu Arkelao estis sangavida. Li

komencis per masakro de eĉ trimil civitanoj, "*Jozefo timis iri tien, kaj avertite de Dio en sonĝo*" jen refoje la agado de la Sinjoro ĉiam kiel gvidanto de Jozefo, "*li loĝiĝis en la regionon de Galileo*", la plej malbonfama regiono de Izraelo, regiono tiom malbonfama ke ĝi ne havas nomon.

Dum Judujo prenis sian nomon de Judaso, unu el la patriarkoj de la dekdu triboj kiuj konsistigis Izraelon, la esprimo Galileo devenas de la malestimo per kiu Jesaja, en ĉapitro 8 celas la regionon de la paganoj. En la hebrea Jesaja skribas Gelil, kiu signifas "distrikto, teritorio" de la paganoj. De Gelil devenas la nomo Galileo, kiu do indikas zonon duonpaganan, zonon for de la religia centro.

Kaj ne nur, "*kaj loĝis en urbo nomata Nazaret*" malbonfama urbo. Ni scias per la evangelio de Johano, la miron de Natanaelo, kiam oni diras al li ke Jesuo venas de Nazaret, kaj li surprizita diras "Ĉu de Nazaret povas eliri io bona?"

"*Tiel plenumiĝis la antaŭdiro de la profetoj: "Li estos nomata …*". Kaj la evangeliisto ne skribas 'Nazaretano', do de Nazaret, sed skribas 'Nazoreo', kaj gravas tiu ĉi vorto, ĉar en tiu ĉi vorto la evangeliisto enfermas tri signifojn:

- Nezer, kiu signifas markoto, plantido, el la profetaĵo de Isaia, en la ĉapitro 11: "Markoto naskiĝos de liaj radikoj, de la domo de Davido", Ijŝaj estas la patro de Davido.
- Nazir, kiu signifas konsekrita
- kaj kompreneble Nazaret, devenloko de Jesuo.